

PENSEO

N-ro 288

okt. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994


Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



Memoro

La lumo mola de la lampo,
 kiun vi bone konis kaj mi,
 flirtas sur la mebloj vitraj kaj alojaj.
 Malvarmo palpebla serĉas vian
 korptemperaturon.
 Kien iris la fingraj premsignoj?
 La spuroj sur la firma planko
 malaperis pro frotado tempa.
 Ombro de nokto batas la muron makulan.
 Zefiro ŝtele foliumas libron papiliotenan,
 kiun iam vi legadis.
 Ravas min aromo de la haro longa,
 kiun vi pretervole lasis inter la du paĝoj.
 En spegulo vidiĝas la sceno:



maja petalo tra fenestro flugis
 sur la nebulan vorton – junion,
 kunportante kodon kunvojaĝan,
 mi tamen rekonis julion.
 Trajno mistrafita nin atendas
 en tempotunelo inter historio kaj futuro.
 Sorto fuŝis la daton mistikan.
 Kato nova kuras sub la liton jam kadukan,
 eltrenas leteron rancan, nefinitan.
 Sur la koverto nun legiĝas neniŭ adreso.
 Kie, kun kiu, vi ĉi-hore estas?

Mi volas skribi vortojn pluajn.
 Subita paneo de elektro.
 La inka nigro prenas mian manon
 kaj devigas min rapide signaturi:
Forgesu!

el Belarta rikolto 2015

**Tiu ĉi poemo gajnis la unuan premion de poezio en Beletra Konkurso 2015 de UEA.*

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Dankon, Haroldo!

Kara Haroldo Dutra Dias,
 antaŭ tre longe vi estas
 vivanta leter' el Kristo.

Per l' evangelia kanto,
 via vorto estas suno,
 oldulon liberiganta
 perditan ene de ni.

Kun amo kaj saĝeco
 de iu elstara Spirito,
 novan tempon vi prisemas
 el lumo por nia Tero.



Juiz de Fora, 28/06/2015

Silento

El la mondo forpelita
 ĝi ŝvebas pinĉante

lunbrilojn kaj sekretojn
sur la haŭto de l' brizo.

Sed poeton ĝi allogas
kaj eniras en poemon
per metaforoj malplenaj
de bruadoj banalaj.

Juiz de Fora, 26/082015

Mori (Usono)




Venos la tempo

Venos la tempo
kiam Homo vidas
Dion en ĉio
kaj ĉion en Dio
kaj Homo diras;
Jes al Dio
kaj Ne al religio!
Venas la tempo
kiam Homo
ne plu kondukas
kiel animalo
kaj inter homoj
ne plu okazas
milito kaj batalo!
kaj la urbojn
ne plu regas
la leĝoj de ĝangalo!
Venos la tempo
kiam ĉiu homo sur la tero
estas libera
kaj ĉiu lando
estas prospera!
Venos la tempo
kiam neniu homo strebas
por esti super-riĉa
ĉar ĉiu homo jam estas
plene feliĉa.
Venos la tempo kiam
homo hontas

pro ĉiuj militoj okazintaj
kaj ĉiuj militoj kaj teroroj
estas konsiderataj
kiel nur historiaj, hontindaj aferoj.
Venos la tempo
kiam Homo komprenas
ke pro paco kaj ordo
ne necesas despotaj reĝoj
nek severaj, humiligaj leĝoj!
Venos la tempo
kiam ĉiu homo
estas kvazaŭ
delikata floro
kaj sekve nenia konflikto okazas
inter du floroj sur la tero!
Venos la tempo
kiam Homo rekonas
ke la celo de la vivo
estas ĝojo
kaj Ĝojo estas
kaj la celo kaj la vojo!
Venos la tempo
kiam Homo scias
ke la sekreto de feliĉo
estas vivi ĝojoplene
ĉiam en la ĉi-momento
kaj sekve neniam
kun pentoj kaj bedaŭra sento!
Venos la tempo
kiam Homo mutacie eksaltas
al pli alta nivelo
de konscio
kaj sekve
ĉiu homo sur la tero
estas kvazaŭ anĝelo
el la ĉielo!



Paŭlo Silas (Brazilo)



HELPU AL MI, AMIKO

Mi evitos vin per senrimarka eliro,
Per rapida malapero, sen adiaŭdiro.
Kiam pensos vi, ke viaflanke mi staras,
Vi perceptos, ke al nenio mi egalas.

Proksimiĝis mi al vi, ĉar estis vi la ilo,
Kiun uzis mi por venki tiun barilon.
Se profiton donas vi, ĉe vi mi najbaras.
Sed ne pensu, ke vi, konato, specialas.

Ne invitu min por partopreni en via
Amikeco tute aĉa, malinda kaj fia.
Mi toleros vin nur kiam vi tre bezonatos.

Se silentos vi obee, eble mi kompatos.
Okupita nun mi estas kun aliulo,
Diskutante burĝe pri riĉaĵo-akumulo.

Cezar (Germanujo)



DEVO KAJ REVO

Dev' ne estas revo.
Pro la devkonspiro
estas virsopiro.

Dev' ne estas mevo.
Trejnate pri la devo,
misfidas vir' al revo.

Rev' ne estas devo.
Por revul' devvoko
estas kaŭz' de ŝoko.

ĜUO

Luno, montoj, lago
kaj veloj jen dum vago.

Kolore ĉio bluas,
kaj mi la bildon ĝuas...

Poet' sub la velo

Poeto sub velo,
kompas' estas belo.
La montoj dormetas,
Lun' blua sekretas.



Siv Burell (Svedujo)



En la ŝranko de mia avin'

En la ŝranko de mia avin'
troviĝas memoraĵoj
de la komenco ĝis la fin'
de ŝiaj multaj jaroj.

Jen la ujo en arĝent'
de ava iama donaco
post ŝipvojaĝ' en dura vent',
kiam la ŝipo saltis sur surfaco.



penetraĵo de la aŭtorino

Jen ok tasoĵ kun ruĝaj koboldoj,
ĉiun Julon ili staris surtable,
kaj ni infanoj, kaj niaj oldoj
ĝojis pro la dancantaj koboldoj.

Jen du blankaj kandelingoj,

donaco de mi por ŝia datreven',
dekoritaj per oraj ringoj,
eble usona la deven'.

Nun mi multajn jarojn havas,
por mi objektoj ne plu gravas.

Ĉuisto (Ĉinujo)



Al mia amatino

Jam longe antaŭ tridek jaroj
Nin ligis arda am' ĉe l'maro
Disiĝis poste en hejmlok'
Sopiras mi kun sentiment'
Restadas mia ama sent'
Mil liojn distas ni jen fore
Mi veas triste kaj dolore



Vasil Atamanjuk (1897-1937)



En stepo

Glata stepo ĝis ĉiel' —
Vastas kaj kvietas:
Jen tapiŝ' sub volba hel', —
Do preĝejo pretas.
Nur al Dio preĝu vi
Tra ĉiela spaco:
— Belan subon vidu, Di',
El Via palaco.
Granda, forta estas Vi,
Kreis nian Teron,
Donu al popol' sur ĝi
Pacon kaj liberon!
Faru por ke stepon plor'

Ne plu malsanktigu,
Di', Kreint', de Via fort'
Donu al ni signon!

Elukrainigis



Petro Palivoda (Ukrainio)

Milton Nascimento (1942—)



KORO DE STUDANTO

(kantteksto)

Ion mi devas paroli
Kie ĝi estas, divenu
Eble ĝi kuŝas enbruste
Aŭ laŭfluas tra l' aer'

Ĝi povas esti apude
Pli proksime ol supoze
Junecofolio estas
Sen dubo l' nom' de tia am'

Ĝiaj songoj jam stuciĝis
Mankis lum' en certaj horoj
Ĝia ridet' de infano
Kiom da fojoj sin kaŝis

Sed espero renoviĝas
Kun novaŭror' ĉiutage
Oni l' ŝoson deĉprizorgu
Por ke ŝprucu l' viv' je
Flor', flor' kaj frukto

En la koro de studanto
Vivo postulu atenton
Mondo postulu atenton
Tie amikec' ne velku

Ĝojo nur kaj multa songo
Dise iras sur la vojo
Verdaj sin prezentas sentoj

Plantoj, kaj la kor'
Kaj junec', kaj fid'.

Elportugaligis



Uel Roša (Brazilo)

Flora Brovina (Albanio)

Kiam oni amputas min

Oni tondas mian hararon
Miajn haroj oni tondas
Ĉirkaŭe lignostako

Kion ci faris Ĵane d' Ark
Kiam oni ciajn harojn eltranĉis

Rondiradas ĉirkaŭe
Ĉirkaŭe rondiradas
La klinkoj ruĝiĝintaj en la fajro

Kion ci faris
Kiam ili rondiradis ĉirkaŭ cin

Oni amputas mian haŭton
La karnon la membrojn
La membrojn miajn oni amputas

Frenezuloj hodiaŭ ekzistas
Plasta ĥirurgio

Doloras ĉe mi la haroj la haŭto
La tuta korpo doloras
La amputitaj partoj doloras

Dio mia
Kiom forte mi kapdoloras



tradukinto Bardhyl Selimi (Albanio) kaj Flora

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO KVARA

Tiu ĉi homa mondo

§04-02

Antaŭ ol esti sendita al la regno Qi por misio, Zigao, la duko de She, venis al Konfuceo, por peti de li konsilon, dirante:

“La princo de la regno de Chu ordonis, ke mi iru al la regno Qi por plenumi gravan mision. La regno Qi probable donos al mi respektan akcepton, sed neglektos mian mision. Estas malfacile persvadi eĉ ordinarulon, por ne paroli pri suvereno! Tial mi estas maltrankvila. Majstro, vi ofte diris al mi: ‘Plenumante ion, gravan aŭ malgravan, oni malofte sukcesas sen konformeco kun la Taŭo. Se vi ne sukcesos, vi estos punata de la princo; se vi sukcesos, vi suferos miksajon de maltrankvileco kaj troa ĝojo. Nur homoj de alta virto ne estas influataj de la rezulto.’ Mi ĉiam nutras min per simplaj nutraĵoj kaj tial neniu iam plendas pri troa varmeco en mia kuirejo. Tamen, ricevinte ordonon de la princo en la mateno, mi jam trinkis glacian akvon en la vespero, ĉar mi estis turmentata de interna varmo pro maltrankvilo! Eĉ antaŭ ol sciigi pri la vera stato de afero, mi jam komencis suferi la miksajon! Se mi ne sukcesos, mi certe estos punata de la princo. La du sekvoj estos pli ol kiom mi, kiel ministro, povos porti. Diru al mi, Majstro, kion decos al mi fari.”

Konfuceo diris: “Estas du universalaj

leĝoj, kiujn oni devas observi: unu estas la destino kaj la alia estas la devo. La amo kaj la respekto de la infano al siaj gepatroj estas la destino kaj estas esence propra al la koro; la servado de la regato al la reganto estas la devo. Troviĝas neniu loko, en kiu ne estus reganto — tio estas la neevitebla realo en la mondo. Jen kial la du estas nomataj universalaj leĝoj observendaj. Tial, zorgi pri siaj gepatroj kaj kontentigi iliajn bezonojn, kie ajn ili vivas, estas la perfekta plenumo de la fila devo; servi al sia reganto kaj efektiviĝi ĉion, kion li dekretas, estas la perfekta elmonro de lojaleco; kulturi sian menson kaj fari ĝin nemovebla de ĉiaj sentoj kaj kontenta pri la neevitebleco estas la perfekta atingo de la virto. Kiel regato aŭ filo, vi devas ofte agi kontraŭ via volo. Vi devas peni sciiĝi pri la efektiva stato de aferoj kaj forgesi vin mem. Tiam vi prenos nenian konsideron pri via amo al la vivo kaj pri via malamo al la morto. Se vi tiel agos, estos bone.

“Sed mi volus diri al vi ankoraŭ ion alian, kion mi aŭdis. Se du regnoj estas tujnajbaraj unu al la alia, ili devas montri reciprokan fidon per efektivaj agoj; se du regnoj estas malproksimaj unu de la alia, ili devas montri bonan fidon per buŝaj mesaĝoj. Buŝaj mesaĝoj devas komunikiĝi pere de iu. Transporti buŝajn mesaĝojn de la plezuro aŭ kolero de la reganto estas unu el la plej malfacilaj aferoj en la mondo. En la mesaĝo, kiu komunikas plezuron de reganto devas esti ia eksceso de troigitaj komplimentoj; en la mesaĝo, kiu komunikas koleron de reganto devas esti ia eksceso de troigitaj riproĉoj. Troigoj similas falsaĵojn, falsaĵoj estas nekredablaj, kaj la mesaĝistoj estos en danĝero. Jen kial antikva aforismo diras: ‘Komuniku la veron, sed ne la troigitajn vortojn, kaj vi probable povos eviti malutilon.’

“Plie, batalo de spritoj komencas per justa traktado kaj finas per kontraŭregula agado. En ilia eksceso multaj nehonestaj

artifikoj estas ludataj. Tiuj, kiuj drinkas laŭ etiketo, komencas en ordo kaj kutime finas en malordo. Ĉe la kulmino de la festeno oni dronas en diboĉado. Ĉiuj aferoj iras sammaniere en la mondo: ili komencas per bona fido kaj finas senescepte en trompo. Tio, kio estas simpla en la komenco, povas fariĝi kompleksega en la fino.

“Vortoj similas ondojn en la vento; komunikado de mesaĝoj riskas aldoni kaj perdi faktojn. Ondoj en la vento facile estigas malkvieton; riskoj povas facile konduki al danĝero. Tial la eksplodo de kolero ofte venas nur de artifikaj vortoj kaj duonveraj paroloj. Kiam bestoj estas minacataj de morto, ili pretervole kriegas. Spasme spiregante ili ekhavas malamikecon kaj atakemon. Sammaniere, kiam homoj estas puŝataj ĝis ekstrema situacio, ili nepre faras ferocan kontraŭbatalon aŭ venĝon sen mem scii kial. Se eĉ ili mem ne scias, pro kio ili kondukas tiele, kiu do scius, kio fariĝos el li en la fino!

“Tial antikva aforismo diras: ‘Ne deviu de la ordonoj, kiujn vi ricevis. Ne plenumu tion, kio estas super via povo. Ekscesaj vortoj estas falsaj troigoj.’ Devii de la ordonoj, kiujn vi ricevis, kaj plenumi tion, kio estas super via povo, estas danĝere. Por sukcesa plenumo de io, estas postulata longa tempo. Kiam io estas fuŝita, estas tro malfrue por tion rebonigi. Vi neniel povas esti tro singarda! Lasu vian menson flugi sekvante la iradon de aferoj. Kulturu vian menson per rezignacio al la neevitebleco. Tio estas la plej bona metodo por vi. Kial vi devus zorgi pri tio, kion diros la princo de Qi? Vi povos fari nenion pli bonan, ol komunikado de la mesaĝoj de via princo. Ĉu tio estos tasko malfacila por vi?”

Elĉinigiŝ



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭtuna vento

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Aŭdiĝas
susuro inter
branĉaro. La birdeto
subite flugis preter
poplo sur la ter'.

Post pluvoj
restis marĉetoj,
aŭtunaj, stratolagoj.
Tie sin banas birdoj.
Sunaj varmĝuoj.

Jen vento.
Amuziĝas ĝi,
dancante kun foliar'.
Rondodancon dancas ni,
belan valson, ĉi.

Lametas
folio akre.
Disiĝos ni kutime
ĉi-aŭtune, tutsakre,
renaskos are.

Ventego
per pordopuŝo
eniras domon. De post
pluvo malseka kuŝo.
Granda pluv' duŝo.



Fuĝantoj survoje al "riĉa" Eŭropo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Jen marŝe
fuĝas loĝantoj.
Ju pli da rifuĝantoj
des pli da martirantoj
Ve, gastigantoj.

Eŭropo
landlimojn fermis.
Ekkreskis dratbariloj.
Registaro protestis
pro krizo, fias.

Pikdratoj
multobliĝis, re
laŭlonge de landlimoj.
Troŝarĝitaj ŝipoj ne
albordiĝis. Ve.

Gumflosoj
malŝveligitaj,
savveŝtoj diŝjetitaj.
fuĝantoj arestitaj,
plu haltigitaj.

Akcepto
de fuĝintoj tut'
fiaskis. Malkvieta
iĝis Eŭropo. Salut'
kun amaragut'.

Lily (Ĉinujo)

En mallumo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

En mallum'
ni kveras kore
kuŝante sur herbejo.
Ni kisas bonhumore

kaj senpudore.
 Li palpas
 al mi leĝere
 la mamojn kaj ekscitas
 la eroton tenere
 ĝis eko vere.

Ekduras
 miaj cicoj jam
 kaj ja en mia brusto
 ekbrulas soifa flam'
 por ludo de am'.

Pelate
 de arda dezir'
 mi sentas humidigon
 suban kaj preskaŭ sen spir'
 krias pro ĝemŝir'.

Deteni
 mi min jam ne plu
 povas de amor-avid'
 je venonta delic-ĝu'
 en mania sku'.

Tuj kaptas
 mi l' kacon de li.
 Ĝin mi knedas tre forte
 por impulsigi lin pli
 al laŭta ĝemkri'.

Brakumas
 li min strikte tre
 kaj langkisas min varme,
 erektiĝas firme de
 pasia akme'.


Ruliĝas
 sur min rapide
 li tuj kacon eligas
 boras en min rigide
 piŝtas senbride.

Tordiĝas
 ni korpoglue,
 frandas delicon seksan
 de amludo plenĝue
 plue kaj plue.

La herboj
 nin tiklas per juk',
 mi nur sentas nebule
 gutadon tra flu-konduk'
 de ĉuro kaj suk'.

* ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5
 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Rebeka Senfamilia (Usono)



Por Sofia

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Vi
 en sinmorta agoni'
 konsilis,
 "Postvivu por mi."

Jam
 ĉesis pensi vi pri sam'
 inter ni.
 Kial vi ne, Dam'?

Vin
 mi bezonis, amikin'.
 Vi estis
 mia insulin'.

Cel'
 ne ŝanĝiĝos, ho Abel'
 Reĝina,
 sed mankos miel'.

(Temas pri neesperantista amikino mia, "Queen
 Sophia", kiu mortis antaŭ du monatoj.)

* ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35
 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Cezar (Germanujo)

Folidanc'


— laŭ ĉinesko Ku-xiangsi*

Foli' flugas en la vent'
laŭdanc
de serpent',
ĝojpetolas
eĉ sen iu pent',
miraklas enaŭtune.
Jen magi'
dum moment'.

Mi observas kun atent'
kun vigla
freŝa sent'
kaj eŭfori'
la ludon de l' vent'.
La lumo min ensorĉas.
Folidanc',
kia splend'.

**Ku-xiangsi (profunda sopiro): ĉina fiksfirma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,45,733 silaboj, laŭ rimarango a,xa,xa,xxa (x = senrima)*

Claude FARRÈRE (1876-1957)



LA VESPERMANGŬO

DE LA BUSTOJ

(2)

«Revenante hejmen, mi ekvidis antaŭ mi, en la kava vojo, kiu kondukis al la somerdomo Makoko, la silueton de mia najbarino. Mi ne hezitis, mi plirapidigis la paŝon kaj ŝin salutis: “Sinjorino, mi diris, ĉu mi havas la honoron paroli al Sinjorino la kapitano Gerardo Belvizaĝo?” Ŝi ruĝiĝis kaj volis foriri ne respondante.

«– Sinjorino, mi insistis, mi estas via najbaro, la kapitano Mikelo Albano...

«– Ha! Ŝi tuj diris, sinkulpigu min, sinjoro... La kapitano Mikelo Albano, ĉu?... Mia edzo multe parolis al mi pri vi.

«Ŝi ŝajnis treege ĝenita, kaj en tiu konfuzo ŝi aspektis ankoraŭ pli bela, laŭeble. Mi daŭrigis, malgraŭ la certa deziro, kiun ŝi havis forfuĝi: “Sinjorino, kiel okazis, ke la kapitano Belvizaĝo revenis Francion, en Tulono-n, ne sciiginte tion al sia plej malnova amiko? Sinjorino, mi ege dankoŝuldus al vi sciigi al Gerardo, ke mi iros brakumi lin, ne pli malfrue ol ĉi-vespere.”

«Vidante, ke ŝi plirapidigis la paŝon, mi salutis ŝin. Sed, post miaj lastaj vortoj, ŝi rigardis returne en agitiĝo pli kaj pli neeksplikebla. “Neeble! ŝi diris, neeble tiun vesperon... Mi... promesas al vi paroli al Gerardo pri nia renkonto... estas la tuto, kiun mi povas fari... Gerardo ne volas plu vidi neniun... neniun... li izolas sin... ni vivas izolitaj... Ni luis tiun somerdomon, ĉar oni diris al ni, ke la najbara somerdomo estis nur loĝata dum kelkaj tagoj, unu aŭ du fojoj ĉiujare, de iu kiun oni neniam vidis...” Kaj ŝi aldiris, per tono subite tre malgaja: “Bonvolu ekskuzi Gerardo-n, sinjoro... ni vidas neniun... neniun... Adiaŭ, sinjoro.

«– Sinjorino, mi diris tre ekscitita, la kapitano Gerardo kaj Sinjorino Gerardo akceptas iafoje amikojn... Tiel, tiun vesperon, ili atendas tiujn al kiuj ili rendezuis la pasintan jaron...”

«Ŝi fariĝis ruĝega.

«“Ha! ŝi diris, tio estas escepta! Tio estas tute escepta!... Ili estas esceptaj amikoj!” Post tio ŝi fuĝis, sed ŝi tuj haltis en sia fuĝo, kaj turnante sin posten ŝi aldiris: “Precipe! Ŝi petegis... Precipe ne venu ĉi-vespere!” Kaj ŝi malaperis malantaŭ la muro.

«Mi rehejmiĝis kaj ekgvatis miajn najbarojn. Ili tute ne vidiĝis, kaj ja antaŭ noktiĝis, mi rimarkis la ŝutrojn fermitajn, kaj tra iliaj interspacetoj lumojn kaj briletojn, kiel mi jam

vidis ilin okaze de la tre stranga nokto, antaŭ unu jaro. Sed mi ankoraŭ ne aŭdis la eksterordinaran tondrobruon de ligna tamburo. Je la sepa, rememorigante la vesperajn vestojn de la sinjorino kunportanta lampo, mi paradvestis min. La lastaj paroloj de S-ino Gerardo nur pli ankris min en mia decido. Ĉi-vespere Belvizaĝo akceptis amikojn; li ne kuraĝus forpeli min. Paradvestinte min, dum momento mi havis la ideon, antaŭ malsupreniri, kunpreni mian revolveron, kaj juĝante min stulta, fine mi samloke lasis ĝin.

«Stulta, mi estis, pro ke mi ne kunportis ĝin.

«Sur la sojlo de la somerdomo Makoko, mi turnis trafe maltrafe la pordobutonon, kiun mi vidis la pasintan jaron turni per ĝi mem. Kaj, je mia granda miro, la pordo cedis antaŭ mi. Oni atendis do iun. Alveninte ĉe la pordo de la somerdomo, mi frapis. “Eniru!” kriis voĉo. Mi rekonis la voĉon de Gerardo. Mi ĝoje eniris en la domon. Unue mi troviĝis en la vestiblo kaj poste, ĉar la pordo de malgranda salono estis malfermita, kaj tiu salono estis lumigita, tien penetris tien alvokante: “Gerardo! Jen mi!... Mi estas Mikelo Albano, via malnova kamarado!...»

«— Ha! Ha! Ha!... Vi do decidis por veni! Mia malnova, mia bona Mikelo!... Ĉi-posttagmeze, mi ĝuste diris al mia edzino, ke plezurigos al mi, ke mi revidu vin!... Sed ke vi estas la sola kun niaj esceptaj amikoj!... Ĉu vi scias, ke vi ne multe ŝanĝis, mia kara Mikelo!...»

«Estus neeble diri al vi mian konsternon. Mi aŭdis la voĉon de Gerardo, sed mi ne vidis lin! Lia voĉo resonis flanke de mi, sed neniŭ estis apud mi, neniŭ ankaŭ en la salono!... La voĉo reparolis: “Sidiĝu! Mia edzino tuj venos, ĉar ŝi certe tuj memoros, ke ŝi forgesis min sur la kameno...”

«Mi levis la kapon... Kaj tiam mi malkovris, plejsupre de alta kameno, buston. Estis tiu busto, kiu parolis, ĝi similis al Gerardo. Estis la busto de Gerardo. Li estis deponita tie, kiel oni kutimas loki la bustojn sur la kamenoj...

Estis busto, kiel ofte la skulptistoj faras ilin, tio estas, ke ĝi ne havas brakojn.

«La busto diris al mi: “Mi ne povas brakumi vin en miaj brakoj, mia kara Mikelo, ĉar kiel vi vidas, brakojn mi ne havas plu, sed leviĝante iom vin sur la piedoj, vi povas preni min en viaj brakoj, kaj malsupreniri min sur la tablon. Mia edzino deponis min tie, pro humora movo, ĉar ŝi diris, mi ĝenis ŝin por purigi la salonon.... Ŝi estas komika, mia edzino!”

«Kaj la busto ekridis. Mi ankoraŭ kredis, ke mi estis la viktimo de iu optika iluzio, kiel tio okazas en la amuzejoj, kie oni vidas tiamaniere, dank'al spegulkombino, ja vivantajn bustojn, kiuj ne estas alligataj al nenio. Sed post mi demetis mian amikon sur la tablo, kiel li ĵus petis min, mi devis konstati, ke tiu kapo kaj tiu trunko sen kruroj kaj sen brakoj ja estis la tuto tiu, kiu restis de la admirinda oficiro, kiun mi konis antaŭe. La trunko rekte sidis sur malgranda ĉareto uzata ĉe la senkruruloj, sed mia amiko ne havis plu eĉ la komencon de kruroj, kiujn oni kutimas vidi ĉe la senkruruloj. Kiam mi diris al vi, ke mia amiko estis nur busto!...»

«Liaj brakoj estis anstataŭitaj per kroĉiloj, kaj mi ne povus diri al vi, kiel li elturniĝis por, jen apogante sin sur unu el la kroĉilo, jen sur la alia, eksalti, saltegi, ruli, fari cent rapidajn movojn, kiuj saltigis lin de la tablo sur seĝon, de seĝo sur la pargeton, kaj subite reaperigis lin sur la tablon, kie li parolis kun mi des pli gaje.

«Mi estis konsternita, mi ne prononcis unu parolon, mi rigardis tiun abortulon, kiu piruetis dirante al mi kun maltrankviliga rikanado:

«— Mi ja ŝanĝis, nu!... Konfesu, ke vi ne rekonas plu min, mia kara Mikelo!... Vi bone faris veninte tiun vesperon... Ni baldaŭ amuziĝos, ĉar ni akceptos niajn esceptajn amikojn... Ĉar vi scias, krom ili... mi volas plu vidi neniun, afero de memestimo... Ni ne

havas eĉ unu domserviston... Atendu min ĉi tie, mi tuj surmetos smokingon...

«Li foriris, kaj tuj aperis la sinjorino, kiu kunportis lampon. Ŝi estis vestita per la sama tualetto de galao, kiun ŝi jam surmetis la pasintan jaron. Ekde ŝi vidis min, ŝi ege malsereniĝis, kaj diris al mi per obtuza voĉo: «Ha! Vi alvenis!... Vi malpravus, kapitano Mikelo... Mi informis mian edzon pri via deziro... sed mi malpermesis al vi, ke vi venu tiun vesperon... Se mi diras al vi, ke kiam li eksciis, ke vi estis tie, li komisiis min, por ke mi invitu vin tiun vesperon... Sed tion mi ne faris... Pro, ŝi diris tre embarasita, ke mi havis miajn motivojn por tio... Ni havas esceptajn amikojn, kiuj estas iafoje tre ĝenaj. Jes, ili ŝatas la bruon, la bruegon... Vi certe ja aŭdis la pasintan jaron... ŝi aldiris glitante al mi insideman rigardon... Nu! Promesu al mi foriri frue...

«— Sinjorino, tion mi promesas al vi, mi diris, dum stranga maltrankvilo ekis kapti min pro tiuj diroj, pri kiuj mi ne sukcesis kompreni la plenan sencon... Tion mi promesas al vi, sed ĉu vi povus diri al mi, kiel okazis, ke mi retrovas hodiaŭ mian amikon... en tia stato! Kia terura akcidento trafis do lin?

«— Nenia, sinjoro, nenia...

«— Kiel nenia?... Vi ne konas la akcidenton, kiu forprenis liajn brakojn kaj kruojn! Tamen tiu katastrofo certe okazis post via geedziĝo.

«— Ne, sinjoro, ne... Kiam mi edziniĝis kun la kapitano, li jam estis tiel!... Sed senkulpigu min, sinjoro, niaj gastoj tuj alvenos, kaj necesas, ke mi helpu mian edzon surmeti lian smokingon...»

«Ŝi lasis min sola, konsternegita, kun tiu unika brutiga penso: «Ŝi edziniĝis kun la kapitano, dum li jam estis tiel». Kaj preskaŭ tuj mi aŭdis bruon en la vestiblo, tiun kuriozan bruon «kvivit... kvivit...», kiun mi ne sukcesis klarigi al mi la antaŭan jaron, kaj kiu akompanis la sinjorinon kun lampo ĝis la pordo de la ĝardeno... La aperado de kvar senkruruloj, sen

kruoj kaj sen brakoj, sidantaj sur etaj ĉaretoj, kiuj mirige rigardis al mi, tuj sekvis tiun bruon. Ĉiuj estis paradvestitaj, tre decaj kun brilaj brustotolaĵoj. Unu havis nazpinĉilon el oro; alia, iu maljunulo, rondajn okulvitojn, la tria monoklon, kaj la kvara kontentiĝis rigardi al mi per siaj inteligentaj kaj fieraj okuloj kun enuo. Tamen ĉiuj kvar salutis min per siaj etaj kroĉiloj, kaj demandis al mi novaĵojn de la kapitano Gerardo. Mi respondis al ili, ke S-ro Gerardo estis surmetante sian smokingon, kaj S-ino Gerardo ĉiam fartis bone. Dum mi prenis la liberecon paroli al ili pri S-ino Gerardo, mi rimarkis oblikvajn rigardojn, kiuj ŝajnis al mi iom mokemaj.

«— Hm! Hm! Eĉ diris la senkrurulo kun monoklo, sen dube vi estas, sinjoro, granda amiko de nia brava kapitano, ĉu?...

«Kaj la aliaj ekridetis kun ega malplaĉa mieno. Poste ili parolis ĉiuj kvar samtempe: «Pardonu, ili diris, pardonu!... Ho! nia miro estas tute natura, sinjoro, trovi vin ĉi tie ĉe tiu brava kapitano, kiu ĵuris, kiam li edziĝis, enfermiĝi kun sia edzino en la kamparo kaj nenium akcepti... Ne, ne, nenium krom siajn esceptajn amikojn!... Ĉu vi komprenas? Kiam oni estas senkrurulo je tia grado, ke tiu brava kapitano konsentis esti, kaj oni edziĝas kun tiel bela virino... estas tute natura!... tute natura!... Sed fine, se li en sia vivo renkontiĝis kun honora homo, kiu ne estas senkrurulo, des pli bone!... Des pli bone!...» Kaj ĉiuj ripetis: «Des pli bone!... Ho! Des pli bone!... kaj gratulon!...»

«Dio mia! Kiom ili estis bizaraj, tiuj gnomoj... Mi rigardis ilin kaj ne parolis plu al ili!... Aliaj alvenis... duope... poste triope... kaj ankoraŭ... ĉiuj rigardis al mi kun miro, maltrankvilo aŭ ironio... Mi estis tute frenezigita vidi tiom de senkruruloj... ĉar fine mi komencis kompreni plejmulton de la fenomenoj, kiuj tiom turmentetis mian cerbon. Sed se la ĉeesto de la senkruruloj klarigis multajn aferojn, tamen la ĉeesto de la senkruruloj kaj la monstra geedzeco de tiu

